

Ekspozicio pri Edmond Privat en la Biblioteko de la Urbo Neuchâtel
okaze de la dekjara datreveno de lia morto
Radioprelego de Claude kaj Andrée Gacond, SRI 475, 1972.11.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Memore al la dekjara datreveno de la morto de Edmond Privat la Universitato de Neuchâtel organizis en la Biblioteko de la sama urbo ekspozicion pri Edmond Privat.

A.- Tiu ekspozicio, kiu okupas la enirejon de la Publika Biblioteko de la Urbo Neuchâtel, prezentas dokumentojn, kiuj nun troviĝas en la Fondaĵo Edmond Privat en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Tiu ekspozicio estis solene inaŭgurita la 7-an de oktobro kaj daŭris unu monaton. Ĝi altiris la atenton de vasta publiko kaj estis priskribita en radio- kaj televido-elsendaĵoj. Multaj miris pri la multflankeco de la personeco kaj agad-kampoj de Edmond Privat.

A.- Jen hodiaŭ kelkajn informojn pri la inaŭgura ceremonio. Dum la du venontaj semajnoj ni legos al vi erojn el la tekstoj de la artikoloj kaj dokumentoj de tiu interesa ekspozicio.

Cl.- Tiun ekspozicion malfermis sinjoro André Sandoz, eksurbestro de la La Chaux-de-Fonds, kiu estas la prezidanto de la Fondaĵo Edmond Privat. Li komprenigis al la ĉeestantoj, ke trans ili troviĝas nenombrebla popolo, kiu trovis inspiradon en la verkoj, artikoloj kaj prelegoj de Edmond Privat. Kun Edmond Privat, tiu homaro revas al la konstruo de mondo senklasa kaj senlima. Sinjoro André Sandoz priskribis la gravecon de la Fondaĵo Edmond Privat, kie estas konservataj ĉiuj libroj, manuskriptoj, valoraj dokumentoj, kiuj respegulas la agadojn kaj radiadon de tiu granda intelektulo.

A.- Profesoro Maurice Erard, nome de la Universitato de Neuchâtel, kie instruadis Edmond Privat de 1945 ĝis 1959, faris portreton de tiu neordinara profesoro pri angla civilizo. Li memorigis, ke Edmond Privat estis la bono kaj tolero mem. Neniu estas malpli pedanta, ol tiu viro nutrata de hejmo kaj ridetanta saĝo. Profesoro Maurice Erard montris, ke Edmond Privat, apud sia instruado universitata, daŭre restis brila ĵurnalisto kaj ne malpli brila prelegisto. Li estis lumturo kaj morala gvidanto por multaj homoj, kiujn la eventoj de la jaroj 1930-1940 hezitis kaj eĉ senkuraĝigis.

Cl.- Sinjoro François Matthey siavice parolis nome de la studentoj de Edmond Privat. Li priskribis sian unuan kontakton kun tiu profesoro revanta al la bono de la homa gento kaj alvenanta al siaj studentoj kun etendita mano kaj neforgesebla mirinda rideto.

A.- Edmond Privat estis membro de la religia societo de la kvakeroj. Sinjoro Pierre Lacoux priskribis la kvakerismon de Edmond Privat, kiu vidis en la kvakeroj kristanojn, kiuj ne parolas, sed agas, celante harmonion en la respekto de ĉies kredoj kaj de la bunta diverseco de la homaj socioj.

Cl.- Sinjoro Pierre Hirsch, la arkivisto de la Fondaĵo Edmond Privat, fine raportis pri la poresperanta aktiveco de Edmond Privat kaj komentariis la ekspozicion. 25 montro-fenestroj prezentas fotojn, leterojn, gazet-artikolojn, manuskriptojn, librojn, karikaturojn, propagandilojn, kiuj ĉiuj provas malkovrigi la variecon de la personeco de Edmond Privat.

A.- Jen montro-fenestro pri la familio Privat, familio de pedagogoj. La patro gvidis lernejon, kie la geknaboj estis soldate vestitaj. Li mem estis oficiro en la kontraŭfajra brigado. La patrino devenis duone el Britio.

Cl.- Alia montro-fenestro montras bibliografiajn raraĵojn kaj verkojn, kiuj inspiris Edmondon Privat.

A.- La vizitantoj miras, kiam ili malkovras, ke la naŭjara Edmond Privat jam redaktoris revueton. Troviĝas apud tiu manskribita franclingva gazeto la unuaj numeroj de *La Juna Esperantisto*.

Cl.- Karikaturaj montras la junan Privat, kiu saltas de Eŭropo al Ameriko. Informiloj anoncas liajn prelegojn. Leteroj kaj artikoloj raportas pri liaj kontaktoj kun laboristaj gvidantoj.

A.- La luktoj por la sendependigo de Pollando, de Ĉeĥoslovakio kaj fine de Hindio, la rilatoj kun Zamenhof kaj Mahatma Gandhi, la kampanjoj favore al la virina voĉdonrajto estas bone respigitaj de ofte komikaj dokumentoj, kiuj atestas pri la sinteno de la kontraŭuloj de Edmond Privat.

Cl.- Edmond Privat kutimis sendi siajn novajn verkojn al siaj kontraŭuloj. Li konservis la dankleterojn. Tiel troviĝas letero de la svisa generalo Henri Guisan, apud manifesto de Pierre Ceresole, la fondinto de Internacia Civila Helpservo, kiu memorigas, ke eĉ dum milittempo oni devas havi la kuraĝon reliefigi la nehoman, kontraŭsocian kaj kontraŭkristanan spiriton de la militismo.

A.- Ni tre esperas, ke iom post iom tiuj interesaj dokumentoj povos esti publikigitaj kun la necesaj klarigoj en diversaj revuoj, tio ĝis la momento, kiam aperos biografio de tiu granda pac-batalanto Edmond Privat.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!